

Alice Lindel,

## Ŝtupoj de l' vivo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La hom' en la infana aĝ'  
ne havas multe ja da saĝ',  
kaj volas havi iom pli  
da jaroj ol jam havas li.

Kun dekok jaroj pensas li:  
„Kun dudek estos aĝa mi. -  
Kaj estas tridekjara ul'  
hom', kiu estas maljunul'.”

Impresas la kvardeko lin,  
jam kvazaŭ de la vivo fin'.  
Sed kiam havas kvindek li,  
forŝovas li la finon pli.

La aĝ' de sesdek jaroj ne  
tro alta ŝajnas esti, tre  
plorinda tamen ŝajnas la  
sepdeka vivojaro ja.

Post okdek restas la esper',  
atingi naŭdek sur la Ter'.  
Kaj nombras tiam tiu ĉi  
la homojn, kiuj aĝas pli.

...

Ĉar vere daŭras cento da  
vivjaroj nur malmulte ja  
pli longe ol dek; pensas mi:  
Per nul' nur diferencas ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "Stufen des Lebens" de Alice Lindel en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2003-03-02.*

*MR-399-1a / Arg-795-1592 (2013-01-23 11:15:31)*

*S-ano Albert Stephan publikigis tiun ĉi Esperantigon de la poemo en la LEA-informilo, en la jaro 2003.*